

La letero de l' Akademio de Esperanto

N-ro 30 : Januaro – Februaro – Marto 1995

ISSN 0986 - 1181

Ĉefartikolo

Kulturon oni flegu!



Kulturo ne iras per si mem, kiel la vento aŭ la pluvo! Kulturo naskiĝas, disvolviĝas, subiĝas al diversaj peripetioj, vivas pli malpli longe, renaskiĝas en novaj kulturoj aŭ senrevene formortas.

Kulturo esprimas sin per difinita lingvo, ĝi vivigas lingvon, portas ties nomon kaj estas karakterizita de ĝi, sed ĝi ne identas al sia instrumento, la lingvo.

Ĉu estas kulturaj lingvoj kaj ne kulturaj lingvoj? Fakte la demando ne havas sencon! Homoj kulturas sin en difinita lingvo : ili nuras tiun lingvon per kulturo. Se neniu kulturis sin en difinita lingvo, tiu estos dirita senkultura. Sed se aperas genio en eĉ la plej obskura lingveto en ĝangalo de la plej fora kontinento, tiam ekaperos kulturo kaj kultura lingvo.

Sed lingvo mem iel estas neŭtrala. Ĝi estas per si mem nur komprenkodo, interkomunika kodo, ĉiam preta redoni la informojn kiujn oni konfidis al ĝi : tiuj estu, ekzemple, la plej balbutaj kaj ludaj vortoj de infano, aŭ la plej abstraktaj teoremoj de sciencisto, aŭ ankaŭ la plej lindaj am-poemoj de juna viro al sia amatino aŭ la plej lirika kaj majesta kanto de filozofo omaĝanta al Damo Naturo. Ĝi povas esti tio kaj ja multo alia. Ĝin limas nur la inventemo de la homo : Dio scias kiel multfaceta ĝi estas!

Homaj socioj estas pli aŭ malpli kulturaj. Iliaj lingvoj sekvas. Se jam estas kelkaj kultur-homoj, ili altiras aliajn; sed tiuj povas siavice esti altiritaj de pli potencaj kultur-socioj. Akvo iras al muelejo; mono altiras monon, kaj tio veras por ĉio, ne nur por la sonanta kaj "kling-klanganta" metalo.

Esperantistoj iafoje disputas pri kulturo aŭ defendas la kulturon de lingvo aŭ alia : la gepatra aŭ la ĵus lernita . . . Sed plej unue ili defendu la kulturon, kiun ili mem produktas en nia internacia lingvo. Se ili sentas sin kapablaj, ili antaŭ ĉio ne forgesu mem produkti kaj apreci ĉion valoran.

Iu redaktoro de gazeto kutimas skribi : *se vi deziras legi pri io, verku artikolon!* Li per tio taŭge instigas al agado. Helpu vin mem, la ĉielo vin helpos! Kio estas vera pri la legado kaj pri la verkado, ja veras ankaŭ por ĉio kultura!

D-ro André ALBAULT

Kion flustras al ni . . . la "vento" de la historio?



Evoluis la homaro – kiel nomadaro – de la primitiva hordo en diversajn tribojn, sed – kiel ne-migremularo – de la antikva civito en mezepokajn provincojn; kaj poste per regrupiĝo de provincoj en pli potencajn naciojn; kaj fine per regrupiĝo de nacioj en pli vastajn unuiĝojn nomatajn konfederacioj. Ja tio efektiviĝis, sed nun ankoraŭ pli emas estiĝi pro kaj laŭ la progreso de transportiloj kaj komunikiloj.

Unu komuna lingvo altrudiĝas praktike pro la premo de la interŝanĝoj komercaj, se ne militaj; sed tiam la premanta kaj la premata lingvoj ja iom post iom "kontaĝas" unu la alian eĉ ofte ĝis plena nerekonnebleco, se ne detruigo. Tial jam de 1977 Claude Duneton en "*le Monde de l'Éducation*"¹⁾ rimarkigis: "*(En Francio) la instruisto pri la Angla lingvo . . . iomete troviĝas . . . en la situacio de "Arverno"* 2) *lerniganta la Latinan lingvon en la jaro 40-a de J.K. La Galla lingvo ne postvivis lin . . .*" Al kio aldonindas: kaj ankaŭ ne la Latina! Ambaŭ difektiĝis kaj naskis dialektojn, same kiel nun estiĝis la "Frangla" priskribita de prof. Etiemble!

La formiĝon de provincaj miksaĵoj sekvis altrudo de lingvoj nomataj naciaj, altrudo plej ofte ŝuldita al ia majstra prestiĝo: tiel estas pri la Franca, la "Francilia" de Francisko la 1-a³⁾: kaj saman rolon ludis pri la Angla la normo de "King's English", pri la Germana la biblia traduko de "Martin Luther", pri la Itala la verkaro de "Dante Alighieri", ktp.

Laŭ principo de multlingvismo formiĝis unu konfederacio; sed temas ja pri la malvasta Helvetia Konfederacio, kie regas ja nur tri ĉefaj lingvoj, cetere en tri partoj. Male la konfederacio Usono por elekto de komuna lingvo procedis per voĉdono, kaj la lingvaĵo eliĝinta el la Angla superis tiun eliĝintan el la Germana *nur per plimulto de unu sola voĉo*. Tial jam de kelkaj jaroj ne malestas konkurenco, interalie tiu de ia Hispana lingvaĵo en la sudaj Ŝtatoj!

Nu por la formiĝonta Eŭropa Konfederacio fariĝis tre aktuala la lingva demando: ĉu sekvi tiajn modelojn? Sed ĉu ne pli racie kaj inde je la civilizacio, kies fonto estas ja Eŭropo, estus studi la problemon por trovi solvon, kiu respektu la riĉan diversecon kaj lingvan kaj kulturan de la Kontinento?

Jen kio memorigas poemojn de J. du Bellay kantanta en la Renesanco pri sia provinca patrolando:

*"Pli plaĉas min la ejo de l' avoj konstruita,
ol de palacoj Romaj la frunto fierspita . . .
Pli mia Galla Lŭaro, ol la Tiber' Latina . . ."*⁴⁾

sed ankaŭ pri sia nacia patrolando:

*"Franci', patrin' de l' artoj, de l' leĝoj kaj armiloj,
vi nutris min longtempe el via mamo ŝvela . . ."*⁴⁾

Verfakte la homo de la XXI-a jarcento prezentos trioblan kultur-identecon: lokan kun la idiomo, kiu ĝin karakterizas, – nacian kun la lingvo, kiu ĝin esprimas, – kaj internacian kun la komunaj elementoj, kiuj formis ĝin dank'al la Komuna Lingvo Internacia. Kiel jam de longe verkis la Latina poeto Terencio: "*Mi estas homo: homa nenio al mi fremdas.*"⁵⁾

J. T.

1) Magazino de la fama Pariza Gazeto "*Le Monde*".

2) Nomo de Galla loĝanto en Aŭvernjo (Centra Francio).

3) Laŭ la Edikto de Villers-Cotterêts (1539).

4) El "*La Sopiroy*" laŭ traduko de prof. Gaston Waringhien (XXI kaj IX).

5) El "*Heautontimoroumenos*" (Memturmentanto): "*Homo sum: humani nil a me alienum puto.*"

Homonimoj en Esperanto konsiderataj nomenklature

Enkonduke

Homonimeco estas lingva okazo, kiam vorto servas por esprimi pluron da nocioj, foje parencaj, foje tre distancaj. Jen fenomeno ĝena por terminologioj kaj nomlenklature. Bedaŭre, neniuj lingvoj kapablas eviti ĝin, tiom malpli sukcesas ĉi-kampe planlingvo Esperanto, kies afiksa sistemo evidente kunportas pli oftan koincidon de vortoj etimologie aŭ morfologie malsamaj, sed fakte samformaj (etera / et-era; laŭtema / laŭt-ema; alven-dato / al-vendato ktp.)

Per ĉi-specaj vortludoj sukcese ĵonglis Raymond Schwartz, sed ni turnu atenton ĉefe al problemoj nomenklaturaj, por respekti la temon indikitan titole.

-OL- kaj -UL-

Kiel unuan problemon tipan por la leksiko de Esperanto, ni esploru koincidon de la radikfina -UL- kun la sufiksa -UL-. Multaj terminoj, kies fina radikparto estas -OL-, povas ekzempli senbazan timon antaŭ homonimeco. Ĉi-speca timo ("fobio") estas dokumentebla jam ĉe la kreinto de Esperanto. Li klopodis eviti konfuzon kun la fundamenta sufikso -UL-, ne hezitante iom misformi fontlingvan aŭ pli internacian termin-aspekton. Substrekinde: ne temas – krom sendanĝeraj esceptoj – pri faka homonimeco, do tiu de tutaj vortoj.

Jen 18 fundamentaĵoj (enkrampe iliaj Latinaj ekvivalentoj): fenkolo (*Foeniculum*), frangolo (*Frangula*), karbunkolo (*Carbunculus*), kukolo (*Cuculus*), kupolo (*Cupulla*), lupolo (*lupulus*), muskolo (*musculus*), orakolo (*oraculum*), pilolo (*pilulla*), pirolo (*Pyrrhula* - birdo, *Pirola* - planto), popolo (*populus*), primolo (*Primula*), ranunkolo (*Ranunculus*), regolo (*Regulus*), skapolo (*scapula*), titolo (*titulus*).

Ni povus esplori, en kiuj okazoj fakte minacus konfuzo pro homonimeco. Ĉu okazo de eventuala "kukulo" – birdo kaj "kukulo" – kuka ulo? Ĉu "lupulo" – planto konfuziĝus kun lupa ulo? Ĉu "muskulo" referencus al muska ulo? Ĉu "orakulo" povus signifi oran kulon? (Cetere, la Latina lingvo disponis ankaŭ pri la formo: *oraclum*, kp. kun la oficiala vorto miraklo el la Latina *miraculum* aŭ *miraclum*.) Aliflanke pirolo tute superflue produktis la homonimecon de la birdo kun la planto. Popolo aspektas nekohere ("malplanlingve") kun populacio kaj populara, dum "populo" apenaŭ konfuziĝus kun popa ulo... "Regulo" – birdo kuntekste ne koincidus kun la fundamenta vorto regulo (*regula*), mem homonima kun rega ulo. Skatolo, kvankam kun -o-, tamen homonimas – sendanĝere – kun la fetora substanco (3-metil-indolo). Skrofolo malbone koheras kun skrofulario, planto kuracanta ĝuste la "skroful(oz)on".

La homonim-fobion pro la radika -UL- heredis ankaŭ la kompetentaj posteuloj de *Zamenhof*. Inter la radikoj oficialaj troviĝas: ampolo (*ampulla*), garolo (*Garrulus*) kaj tegolo (*tegula*). Da neoficialaj PIV-ajoj estas pli: drakunkolo (*dracunculus*), galinolo (*gallinula*), granolo (= granulo 2), kapolo (*capula*), rubekolo (*rubecula*), strangoli (*strangulare*), tragolo (*Tragulus*), unĝolo (*ungula*).

Fine, Esperanta Bildvortaro, restas fidela al la -OL-tradicio, almenaŭ en jenaj du terminoj: kapsolo (*capsulla*) kaj pingikolo (*Pinguicula*). La laste menciita planto devus nomiĝi pli ĝuste: pingvikulo, por ne misformi la internacie kodigitan nomenklaturajon.

Kontraste, ni atentu la terminojn, kies fina radikparto estas -UL-. Kvankam

kelk-okaze ili kaŭzas homonimecon, tamen ili konsistigas la leksikon de Esperanto.

Jen elekto de 13 fundamentaĵoj : angulo (*angulus*), betulo (*Betula*), fistulo (*fistula*), gratuli (*gratulari*), inokuli (*inoculare*), insulo (*insula*), kalkulo (*calculus*), kapsulo (*capsula*), makulo (*macula*), okulo (*ocula*), postuli (*postulare*), spegulo (*speculum*), tabulo (*tabula*).

Okaze de betulo, Zamenhof ne embarasiĝis pro ebla konfuzo kun la fundamenta radiko beto plus la fundamenta sufikso –UL– : li ne enkondukis la misformaĵon "betolo". Ankaŭ grat- kaj gratul-, kalk- kaj kalkul-, ok-ul- kaj okul-, post-ul- kaj postul- ne ĝenis lin. Ĉi-konekse restos eterna enigmo, kial li intervenis ekz-e en la botanikan nomenklaturon, kvankam tute ne minacis homonimeco (kp. la supre menciitajn : fenkolo, frangolo, primolo, ranunkolo k.a.). Nuntempe, la botanikistoj aplikantaj Esperanton pene parkeru, kie restas U (laŭ la Latina) kaj kie ili modifu per O.

Nature, ankaŭ inter la radikoj oficialaj ekzistas tiuj kun –UL– : cirkuli (*circulari*), formulo (*formula*), kalendulo (*Calendula*), konsulo (*consul*), konvolvulo (*Convolvulus*), modulo (*modulus*), pustulo (*pustula*), skrupulo (*scrupulus*), stimuli (*stimulare*). Homonimeco inter cirk-ul- kaj cirkul-, inter form-ul- kaj formul-, inter mod-ul- kaj modul- estas prave neglekteblaj.

Da neoficialaj PIV-aĵoj kun –UL– estas tro multe, por pritrakti ilin ĉi-loke. Ni limigu nin al nomenklaturaĵoj el botaniko kaj zoologio : asperulo (*Asperula*), aŭrikulo (*Auriculus* - limako, *auricula* - planto), forfikulo (*Forficula*), fraterkulo (*Fratercula*), fuligulo (*fuligula*), galbulo (*Galbula*), guemulo, pli ĝuste : huemulo (*Hippocamelus bisulcus*), inulo (*Inula*), kampanulo (*Campanula*), kerkedulo (*querquedula*), klangulo (*Clangula*), krasulo (*Crassula*), limulo (*Limulus*), luzulo (*Luzula*), mimulo (*Mimulus*), opulo (*opulus*), seratulo (*Serratula*), spatulo (*spatula*), spergulo (*Spergula*), tipulo (*Tipula*).

Memkomprene, sennombraj plant- kaj animal-nomoj, kies radikoj finiĝas je –UL–, ne povis eniri tiaspecan vortaron, kia estas PIV, sed perspektive konsistigos vortarojn specialajn. Por ties aŭtoroj validu la rekomendo, ne misformi –UL– al –OL–, sed respekti la kodigitajn nomenklaturon, por la bono de Esperanto, kiun la sciencistoj ne konsideru "ĉifra".

–EN– kaj –IN–

Kiel duan problemon tipan por la leksiko de Esperanto, ni esploru koincidon de la radikfina –IN– kun la sufikso –IN–. La situacio aspektas tre simile al tiu de –OL– kaj –UL–.

Timo antaŭ ebla homonimeco instigis la kreinton de Esperanto al misformado de internaciaj nomenklaturaĵoj, ĉi-okaze per la radikfina –EN–.

Jen 11 *fundamentaj* vortoj (enkrampe iliaj Latinaj ekvivalentoj) : azeno (*asinus*), delfeno (*Delphinus*), ermeno (*erminea*), frakseno (*Fraxinus*), jasmeno (*Jasminum*), karpino (*Carpinus*), plateno (*Platinum* el H. *platina*), rosmareno (*Rosmarinus*), rubeno (*rubinus*), sukveno (*succinum*), tendeno (*tendo*, genitive : *tendinis*). Aldoniĝas gelateno : la participo *gelatus* (= frostiĝinta) de la Latina verbo *gelare* kondukas al la Franca *gélatine* kaj al la Angla *gelatine*. Se ne temus pri fundamentaĵo, sendube oni asertus, ke por Esperanto pli konvena formo estus "ĝelatino" (kp. la Kalocsay-an "ĝelo").

Revenante al la ĵus elmontrita dekunuopo, apenaŭ ni trovus danĝeron de konfuzo pro homonimeco, se la vortoj havus –IN– anstataŭ –EN– : azino, delfino, ermineo, fraksino, jasmino; la foliarbo "karpino" certe ne konfuziĝus kun la fiŝfemalo, "platino" kun la presmaŝina tabulo, "rosmarino" kun la fundamenta bestonoma femalo, "rubino" kun forĵetindaĵoj; "sukcino" devus cedi antaŭ la kodigita mineralnomo : sukcinito; "tendino" pli bone koherus kun la malsano, Latine nomita *ten-*

dinitis (Esperante : tendenito), ĉar en tiu lingvo radikoj genitivaj pli produktivas ol nominativaj.

Ne mirinde, ke la Franceska PIV volonte sankciis la -EN-procedon, kiel ni povas konstati okaze de jenaj 8 vortoj : bukceno (*Buccinum*), fokseno (*Phoxinus*), kareno (*carina*), meleagreno (*Meleagrina*), muskardeno (*Muscardinus*), pingveno (*Pinguinus*), poleno (*pollen*, genitive : *pollinis*), skvateno (*Squatina*). Povus aldoniĝi astateno (*Astatium*), sed la Latina ekvivalento ne konsistas el -IN-; male, la PIV-a formo cedas ĉe ĥemiistoj favore al "astat(i)o"; keroseno ne estas apogata de internacia uzo etnolingva, ekz-e, A. *kerosine*, G. *Kerosin*; oliveno nepre spitas la kodigitan mineral-nomon, ekz-e, A.F. *olivine*, G. *Olivin*, H. *olivina* ktp.; krome, oliveno povus kaŭzi konfuzon kun alia mineralo : olivenito. Aparte oni emfazis la fortimigan nomon Saĥaleno, dum ne sole la fontlingva, sed ankaŭ la internacia formo estas Saĥalino (Poŝatlaso de la mondo, 1970). Tiaspecan perfortadon de geografia nomenklaturado oni devas forte kontraŭbatali.

Malfacile oni komprenas la strangan tendencon al misformado, se tute aŭ apenaŭ ekzistas konfuz-danĝero pro homonimeco. Unusola okazo tiaspeca en zoologio povus aperi ĉe "meleagrino", t.e. la marmolusko kaj meleagrino, femalo de la kortbirdo. (Al tio eblas rimarkigi, ke eĉ la internacie kodigita zoologia nomenklaturado greklatina allasas homonimon, se temas ekz-e, pri malsamaj klasoj.) Tiom malpli ĝenus "karino" kiel florparto kaj karino kiel skeletparto de birdo. Ja kareno mem havas laŭ PIV 4 diversajn signifojn. Ĉu do la 5-a jam ĝenus?

Kuriozan solvon - muskardeno por la gliro kaj muskardino por la malsano kaŭzata de fungoj - liveras PIV. Tamen pli natura solvo estus "muskardino" por la gliro kaj "muskardinozo" por la insektomalsano.

Interesa estas poleno (A. *pollen*, F. *pollen*, G. *Pollen*, I. *pòlline*), ĉar, kiel jam supre dirite, produktivaj formoj estas tiuj kun -IN-, ekz-e, en A. *pollinate*, F. *polliniser*, *pollinisation*, *pollinique*, I. *pòllínico*. Por kompletigi, palino-analizo, -grafio, -logio, -skopio ktp devenas de la Hellena verbo *palino* = mi ŝutas (farunon).

Aliflanke oni zorge distingu : ne ĉiuj nomenklaturaj PIV-aĵoj kun -EN- estas misformitaj. Ekz-e, la "marporko" apartenanta al la cetacoj, nome, foceno (*Phocæna*) estas esperantigita tute bonorde. Okaze de akeno ne estus prave riproĉi pro la -EN-, sed pli eble pro la -K-, ĉar la Latina nomo de la seka frukto estas *achenium*, do plej trafe : "aĥenio".

En PIV-suplemento ni ne trovis nomon (ĉu komunuzan, ĉu propran), kiu estus misformita per -EN-.

Sed jen ni turnu atenton al la 12 fundamentaĵoj kun -IN- : difini (*definire*), ilumini (*illuminare*), inklina (*inclinatus*), karmino (*carminium*), kombini (*combinare*), maŝino (*machina*), muslino (I. *mussolino*), obstina (*obstinatus*), rafini (F. *raffiner*), rezino (*resina*), ruino (*ruina*), urini (*urinari*). Aldonendaj estas du propraj nomoj Berlino kaj Kalvino, kiuj povas servi kiel bonaj malekzemploj por la kripla PIV-aĵo "Saĥaleno" (vd. pli supre).

Prave Zamenhof ne timis konfuzon inter kombin-o kaj komb-ino, maŝin-o kaj maŝ-ino, urin-o kaj ur-ino.

Da oficialigitaj radikoj kun -IN- estas multe pli (35) : abstini (*abstinere*), albi no (*albinus*), angino (*angina*), anilino (*anilinum*), balzamino (*balsamina*), benzino (laŭ la tropika planto : *Styrax benzoin*), destini (*destinare*), determini (*determinare*), disciplino (*disciplina*), doktrino (*doctrina*), galantino (F. *galantine*), gilotino (laŭ la Franca kuracisto : *Guillotin*), glicerino (F. *glycérine*), kinino (F. *quinine*), kumino (*cuminum*), margarine (F. *margarine*), marini (*marinus*, F. *mariner*), medicino (*medicina*), morfino (*morphinum*), naftalino (*naphtalinum*), nikotino (F. *nicotine*, laŭ la Franco Nicot), origino (*origo*, gen. *originis*), parafino (*par-um affinis*), pelerino (F. *pèlerine*), pepsino (*pepsinum*), retino (*retina*), ricino (*Ricinus*), rutino (F. *routine*), stearino (F. *stéarine*), striknino (*strychninum*), tamburino (F. *tambourin*), tanino (F.

tanin), turbino (*turbineus*), vakcino (*vaccina*), vazelino (*vaselina*).

Estas laŭdirde, ke ties oficialigo okazis sen timi konfuzon kun la sufiksa -IN-. Tiom malpli komprenebla estas ekz-e, la pli supre menciita keroseno, kompare kun la ĥemiaj nomenklaturaĵoj : anilino, benzino, glicerino, kinino, margarino, morfino, naftalino, nikotino, parafino, pepsino, stearino, vazelino. La iom ekzakte pensantaj ĥemiistoj strabe rigardas la senmotive arbitran baraktadon inter I kaj E. (Parenteze ni menci, ke kinino estas difinenda kiel kresko-hormono, dum ĥinino nature devus esti la drogo antifebra, ekstraktata el la ŝelo de cinĥono.)

Okulfrapa homonimeco generiĝas per la vorto *rutino*. Apud la nocio de PIV (lerto, kutimo), oni devas akcepti tiun de la flavonoida glikozido entenata en la planto ruto (*Ruta graveolens*). La ceteraj homonim-okazoj (ekz-e, marin-o kaj mar-ino, parafin-o kaj paraf-ino, retin-o kaj ret-ino, turbin-o kaj turb-ino) estas ja tute neglekteblaj.

Da *neoficialaj* PIV-aĵoj kun -IN- estas tro multe (kelkcent), por ke ni povu elmontri ilin ĉi tie. Inter ili ni trovas multajn dekojn da ĥemiaĵoj. Ni menci, almenaŭ la plantsukan pektinon, disde kiu prave distingiĝas la molusko pekteno (*Pecten*). Ĉi-okaze, PIV profitis, ne difektinte la originalajn formojn.

Enkadre de la mineraloj (akvamarino, aventurino, kalamino, silvino kaj turmalino) neniel minacas homonimeco. Sed ekzistas ankaŭ mineralo nikelino (NiAs), homonima kun la kupra-nikela-zinka alojo; tiun ĉi PIV ja registras kaj difinas.

El la plantoj antirino, karlino kaj lupino, sole la lasta homonimas kun lup-ino.

Restas konkludi, ke la granda nombro de la neoficialaj PIV-aĵoj kun -IN- liveras konvinkivan argumenton, por ke aŭtoroj de specialaj vortaroj (ekz-e, ĥemiaj, mineralogiaj, botanikaj, zoologiaj, geografiaj) definitive rezignu pri misformado de la radikfina -IN- per -EN-.

Ke nia konkludo estas ĝusta, povas servi ekzemplo de mineralogia vortaro (T.A. Høeg, 1988). La vortaro registras 24 mineral-nomojn kun -IN- : alabandino, almandino, andezino, aŝkroftino, bertierino, eŭĥlorino, glucino, guanino, ĝismondino, hauino, humboldtino, iridosmino, kornerupino, kupidino, levino, mikroklino, nikelino, olivino, ruterfordino, safirino, serpentino (homonima kun serpent-ino), spesartino, steenstrupino, turmalino. Aliflanke, ĝi registras unusolan nomon, kies originalo estas misformita per -EN- : plateno. Ĉi-okaze ĝi referencas al la fundamentaĵo en PIV.

Ĉu povas esti pli bona pruvo, ke la iama misforma tendenco ne plu estas perspektiva?

Fontoj

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (1970).

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Suplemento (1987).

Mineralnavn (Ng.Eo.A.). T.A. Høeg (1988). Universitetsbiblioteket i Oslo, Skrifter : 15.

Inversa Vortaro de Esperanto (1989). B. Pabst. Esperanto-Centro, Paderborn.

NdIR : De la aŭtoro RNDr. Josef Kavka, el Prago, alvenis la ĉi-supra studaĵo kun jena prezento : "Kara samideano Thierry . . . Almete vi trovos du miajn traktaĵojn "Homonimoj 1, 2", kies unua parto estas jam aperinta (en *Starto*, 1994, 4), la dua aperonta. Mi planas kvin partojn. Eble io el ili interesos vin aŭ la Akademion". - Ja la temo ne estas seninteresa kaj eĉ indas je atento en *La Letero!* (II)

Tamen tiu studaĵo ne estas kompleta! Mankas por tio praktika elvoko de la femala nomenklatur, kiun ĉiu leganto atendas! Ĉu anstataŭ *azenino*, la aŭtoro konsilis la

malagrablan "azinino" aŭ ne? Kaj por la esenca parto mankas la memorigo de Zamenhofa respondo : laŭ li nun estas konsilate sensange "uzi -ilo, -ino, -ulo ktp". Tiu respondo estas komentita en mia verko : A.ALBAULT "Nau prelegoj pri la Fundamento". Iltis, 1990. - Vd. sur p. 90. Plie samloke (p. 93 - 100), mi reproduktis artikolon pri *plateno / platino* uzataj de Zamenhof. Se la fakaj aŭtoroj finfine sekvos la konsilon de Zamenhof, PIV jam havos motivon kunsekvil! Oficialaj kaj Fundamentaj eventuale postsekvos (?). (A.A.)

Skribas gelegantoj

* Françoise Noireau, el Briançon (15-3-95)

"Saluton! Dankon pro la lastapera "Letero de l'AdE". Mi ĉiun fojon ŝatas ĝin kaj precipe ĉi-foje ĝi utilas al mia familio dank'al la klarigoj de Fernand Boyer . . . Mia filo estas 8-jara kaj mi kelkfoje stumblas kaj hezitas en miaj matematikaj klarigoj. Dankon!

* Raymond Marty, el Garches (27-2-95 kaj 28-2-95)

Relegante paĝon kvaran de . . . n-ro 28, mi demandis min, kial ne ekzistas verboj kiel *preti*, *certi*, tiam, kiam uziĝas verbo *ami* ekzemple. La demando estas sufiĉe grava, ĉar oni diras, ke la Internacia Lingvo fondiĝas sur radikoj, el kiuj oni povas fari substantivon, adjektivon, verbon kaj adverbon. Ĉu tiu regulo estas strikta, aŭ ĉu estas esceptoj, kaj laŭ kia regulo?

En mia letero de la 27-a de februaro mi diris, ke en Esperanto verbo ekzistas aŭ ne, se la substantivo eliĝanta de la sama radiko ekzistas aŭ ne. Mi konstatis poste, ke tio malĝustas, ĉar ekzemple *sidi* ekzistas sed la substantivo estas *seĝo* anstataŭ *sido*. Do mi kredas nun, ke la Esperanta vortfarado ekde radiko, estiĝante per aldono de *-o* (substantivo), *-a* (adjektivo), *-i* kaj *-igi* aŭ *-iĝi* (verbo), rezultigas tiel multajn eblecojn, ke okaze oni povas havi du vortojn por unu signifo : sekvas, ke oni devas elekti unu el ambaŭ vortoj. Sed oni povas formuli nenian regulon por la necesa elekto . . .

NdlR – Ŝajne aperas ia konfuzo en via vort-analizo : *sido* ne signifas *seĝo-n*, sed nur pozicion kompare kun *kuŝo* kaj *staro*, dum *seĝo* estas iu meblo, "instrumento" de la pozicio; ĝi estas ia difinita *sid-ilo*! Same *preto*, kiun vi citas, ne signifas *preparo-n*, ĉar la "pre-paro" etimologie koncernas la agojn antaŭe necesajn por atingi la staton de *preto*. Ktp.

Ĝenerale verbo derivita de "adjektiva" radiko estas analizebla kiel ag-vorto kun la senco *impresi -a*, ekzemple : "Nun *bluas la ĉielo*"; "Certas (*nedubblas lia atestaĵo, kvankam mi ne estas certa (nedubanta) pri ĝi*)" . . .

* Iren Strulović, el Tel-Aviv (27-1-95) (dipl. Kembriĝa Univ.)

"Mi ĝoje ricevis vian "Okt-dec. 94 – Leteron" kaj kore dankas. Ĉi-okaze . . . permesu al mi aldoni ĉi tie 2 fotokopiojn, kie vi trovos mian reagon al B. Golden . . . pri la Angla lingvo. El alia vidpunkto mi volas mencii, ke foje en nia klubo mi rilatas al viaj informoj pri nia lingvo ĉiam bonaj. Sincerajn salutojn kaj bondezirojn."

* Humphrey Tonkin, el University of Harford (2-10-94)

"Mi bezonas la helpon de ĉiuj miaj kolegoj en la Akademio, kaj eventuale ankaŭ de aliaj. Se iu vidos en la aktuala E-gazetaro aŭ aliloke artikolojn, kiuj rilatas al *Shakespeare kaj Esperanto* (aŭ en Esperanto), bonvolu nepre atentigi min pri ili. Efektive mi fariĝis kunlaboranto pri Esperanto por la ĉiujara *World Shakespeare Bibliography*. Estas grave, ke ĉiu titolo aperu!"

Legado kaj lezuroj ¹⁾

Mi aŭdas la diron, ke estas krizo de la legado. Necesus analizi ĝian eston. Neniame tiel multe da homoj tiel multe legis. Sed estas legado kaj legado. La gazetaro de l'koro aŭ de l'sporto, la ilustritaj semajnaĵoj, la diĝestoj ege konkurencas la verajn librojn. Tion saman oni diras ankaŭ pri la filmoj, la radio, la televido, sed tio ŝajnas malpli certa. Tute kontraŭe povas okazi, ke ili kondukas al la libroj, ke ili estas ties plej efika reklamo.

Kio sendube estas vera kaj pli grava, tio estas ke en tiu rapida mondo en kiu jen ni troviĝas, en kiu ni ĉiam devas kuri, surdigitaj de la samaj bruoj, blindumitaj de la samaj lumoj, ĉiam eltiritaj el ni mem, kaj elĉerpitaj, ni ne plu legas, ja ofte, kiel necesus legi. La laceco mem inklinas nin legi por pasigi la tempon, kiun ni ankoraŭ havas, neniel por plenigi ĝin! De tio tiel multe da legadoj imbecilaj kaj senutilaj.

Mi ofte opiniis, ke en niaj lernejoj oni ne sufiĉe instruas legi, bone legi. Sendube oni diras al la infanoj: "Legu! Legu!". Sed t'o 'stas kvazaŭ ĵeti ilin en la maron. Necesus diri al ili, kion legi, kaj kiel legi, laŭ ilia aĝo, ilia karaktero kaj iliaj scivolaĵoj kaj tre frue fari de la legado ilian bezonon, ilian pasion... Formi homon devus hodiaŭ esti jam savi lin el la bruo, el la amaso... Necesus lernigi lin esti sola kun iu libro, rekonduki lin al lia soleco, kiun li per tio ekamu. Necesus ilin prepari al tiuj longaj lezuroj, kiujn la novaj teknikoj promesas al ni, kaj kiuj, laŭ la uzado kiun el ili li faros, lin igos pli inteligenta aŭ pli stulta.

1) *Lezuro* : tempo, pri kiu oni povas disponi ekster ordinaraĵoj; libertempo; distro dum libertempo (A. *leisure*, E *leisir*).

LA LETERO DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO. Trimestra informa letero eldonita de "La Amikoj de l' Akademio de Esperanto", 5, rue Léon Cogniet, 75017 PARIS, Francio. — *Redaktoro* : Jean THIERRY. — *Direktoro de la publikaĵo* : André BOURDEAUX. — *Presejo* : COCONNIER, 72300 SABLÉ. — *C.P.P.* : n-ro 6971. — *Prezo* : 1 n-ro : 40 FRE — *Jara abono* : 120 FRE — *Pagebla* : ĉe kontoj : Banka : Crédit Lyonnais n-ro 7090 F — Poŝtĉeka : 735 27 B Paris. — UEA : Poŝta Banko Nederlando 37 89 64 (ĝirofiĉejo Den Haag) : nepre indiku "por la Amikoj de l' Akademio de Esperanto" (40 gld).

Perantoj por diversaj landoj :

Aŭstralio : Libroservo de AEA, Post Office Box 230, MATRAVILLE, N.S.W., 2036 Aŭstralio.

Azio (tuta) : S-ro UMEDA Yosimi, I.P.O.B. 5458, TOKYO 100-31, Japanio.

Benelukso : KARILJONO, Doornstraat 22, 2610 WILRIJK, akceptas diversajn kreditkartojn. La prezo estas 960 BEF

Brazilo : Brazila Esperanto-Ligo : SeS Ed Jockey Club — Sala 103. BR 70300 BRASILIA DF (Caixa Postal 11 11 05), Brazilo.

Germanio : S-ro Claus J. GÜNKEL, Postfach 100447, D 41704 VIERSEN, Germanio. — Poŝtĝiro Hannover (bankkodo 250 100 30), konto-n-ro 5706 31-301 (36 DM).

Kubo : S-ro Orlanda RAOLA Gonzalez (E-o-Redakcio de Radio Havano), Longa 220, apt 5, Mantilla, 13800 LA HABANA, Kubo.

Meksiko : S-ro Enrique LEMUS Rodriguez, Insurgentes Sur, 3493 villa Ilimpica edif. 27-001, 14020 TLALPAN MÉXICO DF, Meksiko.

Rusio : D-ro Sergey N. KUZNETSOV, Semashko 1/12 RUS 103009 MOSKVO.

Svedio : Sveda Esperanta Federacio : c/o Lisbet ANDREASSON, Södra Rörum pl. 455, S 242 94 HORBY, Svedio.

Usono : Eldonejo Bero : P.O.Box 13492, BERKELEY CA 94712, Usono (23 \$).